# EKO 2025

**UEA pri la UN-tago**

EKO 2025-44, Novembro 17  Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Alkroĉaĵo HRTSume ? KB

## UEA mesaĝis pri la UN-tago

Fine de oktobro okazis la  UN-Tago.  Jen la mesaĝo de UEA al UN okaze de tiu tago.

“La Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj gastigis aparte gravan kunsidon lastatempe. Niaj reprezentantoj en UN tion organizis. Vidu la ĉi-kunan raporton. Kiel vi scias, unu el niaj prioritatoj estas emfazi, memorigi, pledi por multlingvismo en UN (kontraŭe al la ĉiam kreskanta monopolo de la angla lingvo).

Okazis la Ĝenerala Asembleo de la Konferenco de NROj (CoNGO), en Novjorko. En tiu Asembleo oni elektis la novan Estraron de CoNGO. UEA estas membro de la nuna Estraro kaj venis al fino de sia mandato.  TEJO estis kandidato por la nova Estraro. Vidu la plenan tekston en la alkroĉaĵo.

Humphrey Tonkin

**Alk. estas 4p HRT**

## Slovenaj kursoj – retaj kaj fizikaj

Kun la nova lernojaro, ni lanĉas kursojn kaj rondojn por lernado de Esperanto per fizika ĉeesto. Ilia graveco por nia movado estas grandega. Tiel ni akiras novajn subtenantojn kaj membrojn, same kiel instruistojn kaj mentorojn, kiuj akiras lingvajn kaj gvidajn sciojn kaj sperton, kaj fine, ni cirkuligas lernolibrojn kaj alian literaturon. Kvankam partopreno en individuaj kursoj kaj rondoj estas modesta, estas kuraĝige, ke ili estas distribuitaj tra Slovenio: Ljubljano, Kranj, Izolo, Mariboro kaj Slovenj Gradec. Ni ankaŭ pripensas retan kurson por tiuj, kiuj ne povas ĉeesti kursojn kaj rondojn persone en la menciitaj lokoj. Ni aparte memorigas spertajn parolantojn de Esperanto aliĝi al progresintaj rondoj por renovigi siajn lingvajn kapablojn kaj instigi legadon  en Esperanto



## Zora Heide en la memoro

Ŝi naskiĝis kiel Katica Zorka Vinceljak en novembro 1924 en Levinoviac, studis juron en Zagrebo. En 1948 ŝi diplomiĝis kiel medicina teknikistino kaj laboris en la Zagreba higiena instituto 1960, kiam ŝi. post la geedziĝo kun la dana esperantisto Karl Johann Heide, kaj ekloĝis en Danlando, poste en Svedio (1979-93) kaj Islando (1993-99), kaj en 1999 ŝi revenis al Kroatio.

Ŝi lernis Esperanton infanaĝe ĉe sia patro, vilaĝa instruisto kaj

esperantisto Mijo Vinceljak, ekde 1953 aktivis en la fervojista Esperanto-societo en Zagrebo, kie ŝi instruis Esperanton kaj kunredaktis la fervojistan periodaĵon. En 1964 ŝia unua Esperanta poemo "Enigmo" aperis en "Norda Prismo". Ŝi verkis kaj tradukis en/el pluraj lingvoj, en Esperanto aperis kvin ŝiaj libroj: "Ni, homoj" (1970), "Ni komedietas" (1971), "Etulaj aventuroj" (1983), "Spuroj de l' doloro" (1984), "Groteskaj dialogoj" (1985).

Inter Esperantaj tradukoj de Zora Heide estas "Krepuskoj de V. Stahuljak (2001) "Sovaĝa ĉevalo" de B. Prosenjak (2016), "Mor" de Đ. Sudeta (2022). k. a. En 1984 aperis "Kantoj de l' silento" kun ŝiaj kroataj poemoj tradukitaj en Esperanton de L. Borčić, I. Borovečki kaj E. Lapenna. Zora Heide ricevis plurajn premiojn ĉe naciaj kaj internaciaj literaturaj konkursoj, interalie en Liro-2000.

En novembro 2024 oni festis ŝian centjariĝon en Zagreba maljunulejo. Zora Heide forpasis kelkajn semajnojn antaŭ sia 101-a naskiĝdatreveno.

**Halina Gorecka. Aleksander Korĵenkov**

## Danuba-Balkana kunsido

Samir Ribić prelegis pri la artefarita intelelekto. La venonta Balkana-Danuba kunlabora kunveno okazis sabaton la 15-an de novembro.  Registraĵo de la kunveno:  Grandeco ĉirkaŭ 885 MB. La video daŭras 86 minutojn. Rekta ligilo por elŝuti la video-registraĵon de kunveno estas: https://www.eo.slikom.eu/2025-10-bdk.zip

## Ateistoj kune

Jen la registraĵo de nia dimanĉa kunveno, farita de nia estrarano Roberto Garcia. Mi petas vin ne plusendi ĝin al homoj, kiuj ne estas membroj de ATEO.

https://www.dropbox.com/scl/fi/okoisgghfg6uchmmpzr4r/ATEO-kunveno-2025.10.12.mp4?rlkey=fihvge0ovtl5te2ahzog9v0ks&st=mv071m9a&dl=0

Anna Löwenstein

## Brazila-Brita kunlaboro

Jen nova traduko de la angla kanto *And I love her*, verkita de **John Lennon** k **Paul McCartney**. Tiun esperantigon faris **Erick Fishuk**, kaj la titolo iĝis Grandega amo:

## Graca progreso plaĉas

Je la 17-a de novembro 2025 al  la 111-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la unua ĝis la oka de aŭgusto 2026 en Graco (Aŭstrio), aliĝis 325 personoj el 46 landoj, plej multe el Germanio (56) kaj Aŭstrio (29).

Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/10/graco-3/ kaj aliĝu al UK-111.





## SAT kongresis en Francio

En la septembra/aŭtuna eldono de L*a Ondo de Esperanto* aperis artikolo de Gary Mickle pri la 98-a kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu okazis en aŭgusto en la kastelo Greziljono (Francio). Legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2025/10/sat-11/

## Eŭropaj monbiletoj

Ĉu vi sciis, ke en 2027 eble aperos tute novaj monbiletoj en Eŭropo? Kaj ke ili eble montros ne plu pontojn aŭ vitralojn, sed famajn personojn **aŭ eĉ birdojn**?
Ĉu vi preferus vidi **Betovenon** aŭ **blankan cikonion** sur via monbileto?
La artikolo klarigas, kial la eŭrobiletoj ĝis nun aspektis tiel neŭtralaj kaj arkitekturaj, kaj kiel la Eŭropa Centra Banko nun petas la opiniojn de civitanoj pri pli senteblaj kaj kulturriĉaj bildoj. Temas pri vere aktuala kaj atentokapta debato!
**Verkita de:** Laurent Ramette; **Voĉlegita de:** Patrick Morando.
Vi povas **legi** kaj aŭdi la artikolon ĉi tie:
**https://uea.facila.org/artikoloj/legaĵoj/ĉu-birdaj-monbiletoj-en-eŭropo-r492/**



## Brazila muziko

Jen bona video farita de **Vicente Sales** de la kanto Tropikulino (originale *Morena tropicana*), verkita de **Alceu Valença**, laŭ traduko de **James Rezende Piton**:

## Plia kurso el Krakovo

La kurso je nivelo B1 estos gvidata en Interreto, vive, realtempe. Instruos Maria Majerczak. Per intensiva parolado kaj skribado kaj Interesaj materialoj. Ĉiu kursano estas bone prizorgata. Ne estas aĝo-limo. Sep-monata kurso, kun lecionoj okazantaj unufoje semajne.
La **oficialaj konfirmiloj** pri la partopreno enhavas, krom la konfirmo kaj blazono de la universitato, la markon de la prestiĝa, internacia EAQUALS-kvalito de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato, kio plialtigas ilian internacian prestiĝon.
Studu Esperanton ĉiusemajne kun gesamideanoj en diversaj landoj, sen eliri el via hejmo. Limdato por aliĝi: 17 novembro 2025 aŭ poste, laŭ disponeblaj lokoj.
Pli da informoj pri la kurso: https://bit.ly/37MIYye
(aŭ https://docs.google.com/document/d/1JvimMeNl-nc3VJhi44f6NjbzDuaZvepiVRl0BYdEW5c/preview)
Se, studinte ĉiujn informojn en la ĉi-supre indikita retpaĝo, vi decidis **ALIĜI**, bv. skribi al: esperanto.instruado.jag.univ.pl(ĉe)gmail.com (ni publikigas la adreson de la kursoj en ĉi tia kontraŭ-spama formo).

Maria Majerczak


# Ĉu eblas rakonti tutan vivon aŭ senton en nur 100 vortoj?

Jes – tion montras la ĝenro de mikronoveloj, kie ĉiu vorto estas elektita kun precizeco, kaj neniu silabo perdiĝas. En la retejo *uea.facila* nun aperis emocia ekzemplo de tia konciza verkado: **"La plej mallonga tago"** de Jorge Rafael Nogueras, portorika verkisto plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj.

La rakonto en nur kelkaj linioj sukcesas resoni profunde pri amo, perdo kaj la fragila daŭro de la tempo. Ĝi estas samtempe simpla, mallonga kaj tre tuŝa – pruvo ke mallongeco ofte portas la plej grandan pezon. Vi povas legi kaj aŭskulti ĝin ĉe la adreso: https://uea.facila.org/artikoloj/literaturo/la-plej-mallonga-tago-r490/.

La tekston voĉlegis Rafa Nogueras kaj Derek Roff.

Legu kaj aŭskultu ĉi tiun mikronovelon, kaj malkovru kial la plej mallonga tago povas resti en la memoro kiel la plej longa sperto.Tio estas nova kaj interesa artikolo en la retejo uea.facila.org, kiun prizorgas **Anna Lŏwenstein** kun siaj kunlaborantoj (https://uea.facila.org/kunlaborantoj/).




Speciala oferto!

175 jarojn post la naskiĝo de la skota verkisto

Robert Louis Stevenson

(13 novembro), ĉi-monate ni ofertas lian romanon

Forkaptita

kun sesona rabato sendepende de la mendata kvanto.

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

## Kvardek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.